Ĉapitro 6 – Alveno kaj akceptiĝo

Enhavo

1. Novaj vortoj
2. Novaj gramatikaĵoj
3. La rakonto
4. Enhavaj demandoj
5. Tabelekzercoj
6. Plenigekzercoj
7. Respondekzercoj

Novaj vortoj por ĉapitro 6

afabla	lesbo
akcepti	manĝi
amiko	mapo
aspekti	membro
budo	memori
dubi	paŭzo
flago	preferi
horo	ruĝa
informo	sata
knabo	sekso
konsenti	sukcesa
kredi	ŝildo
kvitanco	teksto
labori	timi
laca	vico

Novaj gramatikaĵoj por ĉapitro 6

Sube vi trovas mallongan klarigon pri aferoj, kiuj aperas en la teksto.

Korelativoj

Ial	Por/pro io, kun iu kialo.	Mi **ial** ne faris.

Prepozicioj

Sub	Malsuper	**Sub** flago.

Afiksoj

-an-	Membro, apartenanto.	urb**an**o
-in-	In-seksa.	knab**in**o
-ont-	Kiu faros ion.	ven**ont**a

Alio

Ol	Kompar-vorto.	Pli bona **ol** ĝi.

Ĉapitro 6.1 – Alveno kaj akceptiĝo

Ina kaj Kabe alvenas post sukcesa vojaĝo kaj uzado de Pasporta Servo en du urboj.

Kabe: Jen, vidu, tie estas granda Esperanto-flago.

Ina: Jes, kaj sub ĝi estas ŝildo kun la teksto ‘Bonvenon al IJK!’. Hu ra! Ni do finfine alvenis.

Kabe: Jes… Mi estas tre laca kaj malsata… Ĉu vi pensas, ke ni povas tuj ion manĝi?

Ina: Mi dubas pri tio… Unue ni devas akceptiĝi ĉe la akceptejo, kaj tio povas daŭri longe, miasperte.

Kabe: Ho ve! Ĉu tio estas la vico por la akceptejo?

Ina: Mi timas, ke jes. Ne estas tute perfekte alveni vespere… Sed ni povas babili kun homoj en la vico. Jen, mi vidas amikon de Rusio! Saluton, Katja!!!

Kabe: Mi estas malsata, mi volas manĝi.

Ĉapitro 6.2 – Alveno kaj akceptiĝo

Post ĉirkaŭ 2 horoj en la vico kun novaj kaj malnovaj amikoj

LKK-ano: Bonvenon, kiu vi estas? De kiu lando? Ĉu vi antaŭpagis? Se jes, bonvolu montri la kvitancon. Ĉu vi estas TEJO-membro? Se ne, vi povas membriĝi ĉe la venonta budo.

Ina: Jen kvitancoj de antaŭpagoj, membrokartoj kaj niaj pasportoj.

LKK-ano: Tre bone. Do, mi vidas, ke vi loĝas en amasloĝejo kaj manĝos en la junulargastejo. Ĉu ĝustas tiuj informoj?

Kabe: Jes.

LKK-ano: Perfekte. Vi povas pagi kaj ricevi sakon kun programo, mapo ktp. ĉe la ruĝa budo, tie.

Ina: Bone, dankon.

Ĉapitro 6.3 – Alveno kaj akceptiĝo

Kabe: Tiuj personoj vere aspektis lacaj… Kaj ne estis tre afablaj.

Ina: Vi pravas, sed memoru, ke la LKK laboras jam dum eble ok horoj sen multe da paŭzoj. Mi certas, ke ili estos pli afablaj kaj babilemaj dum la semajno.

Kabe: Bone. Nun ni trovu la amasloĝejon, kaj poste mi ŝatus ion manĝi…

Ina: Ĉu vi vidis la knabinon ĉe la TEJO-budo?

Kabe: Jes, kio pri ŝi? Ĉu vi konas ŝin?

Ina: Bedaŭrinde ne… Sed ŝi estas ege bela, ĉu ne?

Kabe: Mi konsentas, tamen ne bone komprenas… Ĉu al vi plaĉas inoj?

Ina: Jes… Mi volis diri al vi antaŭe, sed ial ne faris.
Virinoj plaĉas al mi pli ol viroj aspekte ktp.

Ĉapitro 6.4 – Alveno kaj akceptiĝo

Kabe: Ĉu – ĉu vi estas…?

Ina: Jes, mi estas samseksemulo. Oni povas diri ankaŭ lesbo.

Kabe: Bone… Mi tute ne sciis… Sed mi ĝojas, ke vi diris. Fakte mi ĝojas ankaŭ , ke vi estas samseksemulo. Vi estas la plej afabla kaj agrabla lesbo, kiun mi konas!

Ina: Dankon! Ĉu vi konas aliajn?

Kabe: Ne.

Ina: Sed kiel vi scias tion?

Kabe: Fakte… Ĉiukaze mi kredas, ke tiu knabino, pri kiu vi parolis, preferas virojn!

Ina: Ni vidos…

Demandoj pri ĉapitro 6

Diru al mi:

1. Kion Kabe volas fari?
   - Kabe volas manĝi.
   - Kabe volas babili kun homoj.
   - Kabe volas enviciĝi.
2. Kiom longe Ina kaj Kabe staris en la vico?
   - Ili staris du horojn.
   - Ili staris unu horon.
   - Ili staris tri horojn.
3. Kie loĝos Ina kaj Kabe?
   - En la junulargastejo.
   - En la tendaro.
   - En la amasloĝejo.
4. Kie manĝos Ina kaj Kabe?
   - En la amasloĝejo.
   - En restoracio.
   - En la junulargastejo.
5. Kial la LKK-anoj estas afablaj?
   - Ĉar tio estas ilia laboro.
   - Ĉar ili ŝatis Ina kaj Kabe.
   - Ili ne estis afablaj.
6. Kia estas la knabino ĉe TEJO-budo?
   - Ŝi estas ege bela.
   - Ŝi estas afabla.
   - Ŝi estas laca.
7. Ĉu al Ina plaĉas knaboj?
   - Jes, al Ina plaĉas knaboj.
   - Ne, Ina preferas inojn.
8. Kiom da lesboj konas Kabe?
   - Multajn.
   - Du.
   - Nur unu.

Plenigekzerco pri ĉapitro 6

Via tasko estas plenigi la malplenan spacon (liniojn) per ĝustaj vortoj. Vi povas elekti vortojn nur el la listo kiu sekvas post "Vortoj:". Sukceson!

Vortoj: **et, em, ebl, iĝ, ig, ant, ul, an, ej, ont**

Unue kongres_____oj devis akcept_____i ĉe la akcept_____o. Komence la organiz_____oj ne estas tre afablaj, tamen poste ili iĝos pli babil_____aj. Vi devas al mi klar_____i, kiel trov_____as la amasloĝ_____o. Se vi ne estas membro de TEJO, vi povas membr_____i al ĝi dum IJK. IJK estas mallong_____o de Internacia Junulara Kongreso. En ven_____a jaro en ĉi tiun urb_____on venos multe da jun_____oj.

Respond-demand-ekzerco pri ĉapitro 6

Jen respondoj. Kompletigu la demandojn tiel, ke ili rilatu al la grasa frazero.

Ekzemploj:

1)	Ili povis membriĝi **ĉe la venonta budo** .	**Kie** ili povas membriĝi?
2)	Ni veturu **al la kongreso** ĉi-jare.	**Kien** ni veturu ĉi-jare?

Faru mem:

1)	La informo **ial** estis iom malĝusta.	_____la informo estis iom malĝusta?
2)	**Tiu virino** plaĉas al mi pli ol vi.	_____plaĉas al mi pli ol vi?
3)	Ili ne venis tien **ĉar ne havis monon por la vojaĝo**	_____ili ne venis tien?
4)	Ili ne partoprenis la kongreson pro **tre grava afero** .	Pro _____ili ne partoprenis la kongreson?
5)	Ili ne partoprenis la kongreson pro **tre grava** afero.	Pro _____afero ili ne partoprenis la kongreson?

Ekzemploj:

1)	**Jes** , ili povus kanti dum la kongreso.	**Ĉu ili povus kanti dum la kongreso?**
2)	En la dancejo **vespere** estis multe da homoj.	**Kiam en la dancejo estis multe da homoj?**

Faru mem:

1)	Sub **ĝi** estas ŝildo kun la teksto.	
2)	Sub ĝi estas **ŝildo kun la teksto** .	
3)	Mi ne volis **tiel** respondi.	
4)	Mi ne volis **tiel respondi** .	
5)	**Jes** , ŝi estas membro de TEJO.	
6)	Ŝi uzis tiun libreton **en tri kontinentoj** .	
7)	**En la dancejo** estis multe da homoj.	
8)	Li ricevis **sakon kun programo** .	